

# PENSEO

*N-ro 221*

*mar. / 2010*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Mikaelo Bronsxejn (Rusio)



## Poetoj

Sennombras stelaro sennoma  
en la Galaksio.

Ja, tute ne gravas la homa  
nescio aŭ scio

por ili, lumantaj libere  
tra tempo kaj vasto.

Samtiel ellumas surtere  
sen brua bombasto  
modestaj poetoj, revuloj  
la vortan sinceron.

Kaj tiu kvieta forbrulo  
varmigas la Teron.



## Bonan Vesperon

Bonan vesperon, nova aŭtun',  
rufharulino!

Haŭton karesas milda tuŝet'  
De via spiro,

Kaj estingiĝas tinta latun'  
Ĉe l' taga fino,

Kaj ekruĝiĝas lanta kviet'  
De sunsubiro.

Ni, aŭtunaj, ne plu junaj

Amas tarde eĉ pli arde,  
Kronoj brulas, vento lulas  
En karesa flu'.  
Longas tempo ĝis printempo  
Do en nuno ni, aŭtuno,  
Kune spiru, kune iru,  
Kune amu plu.

Bonan vesperon, nova aŭtun',  
mia bonkora!  
Mi vin invitis, mi en kamen'  
Fajron bruligis.  
Dancas en vinoj de mia jun'  
La luno ora,  
Senpacience gvatas seren',  
Kiu nin ligis.

Venu festa, en majesta  
Ora pelto via svelto  
Vokas loge – jen apoge  
Estu mia brak'.  
Kun surprizo – vangokiso  
Ne laŭmende, senpretende  
Ĝena honto, ĝoja ondo  
Por la kuna vag'.



Bonan vesperon, nova aŭtun',  
Min ekreganta!  
Mil melodiojn pentras vi per  
Bunta naivo.  
Do mia mondo iĝas de nun  
Paca kaj kanta

Post forbrulinta brua somer'  
De mia vivo.

Ni ĉelune kantu kune,  
Lumrivero en aero  
Akve lirlas, sonojn kirlas  
Pura melodi'.  
Tagoj kuraj – revoj nuraj,  
Luma falo en realo,  
Kaj al disto - dolĉo, tristo  
Kune iras ni.

## Josip Pleadin (Kroatio)



MIA PENELOPO

En ŝipo truita, sen remiloj kaj kun ŝiritaj veloj  
tra fremda mondo ankoraŭ daŭras mia  
odiseado—  
nek al hejmo nek al patrujo—ĉiam al  
nekonataj celoj  
kun la rikanaj uraganoj kaj la freneza  
ŝipbalancado.

Mian ŝipon ŝiras Sciloj kaj Haribdoj per  
ŝtaltenajlo.

Parcoj alvokas min al mortiga puŝ' ĉe  
klifvertikalo.

Mia senpova animo en kanonado de  
senkompata hajlo  
tremante tenas strilon. El mar' eruptas abunda  
gutvualo.

Mizero mia en marspegul' rebrilas, sed mi ne  
reziĝnas


obsedon de aventuro. Min ne frakasas manoj  
de Ciklopo.

Mian vivon per sanga ŝvito mi sigelas, kaj ĝi  
dignas.

Sur hejma sojlo atendas eterne mia fidela  
Penelopo.



## Maristo (Rusujo)



Sentitole

En teda lok' en urba bru'  
Mi tiris min, aspiris plu,  
Falante sur la teron.  
Mi provis flugi en nebul',  
Timante la malveron.

Kaj mia far', kaj mia sent'  
Ne estis plu la argument',  
Mi sentis nur malbenon.  
Vagadis mi en la obskur'  
Streĉante mian penon.

Sen la esper' por ajna cel'  
Soifis mi en la mizer'.  
Ĉe er' metante eron,  
Mi iĝis vera senpekul',  
Akiris oran veron.

23.07.2009



Skribema hom', vi ĉiam sentimentas  
Rememorante tagojn de l'obskur'.  
Sed kiucele vi memelokventas?  
Ĉu kontentigas vin lasita vivospur'?

Pensante pri la mond' kaj agoj universaj  
Ĉu vi ne perdis sencon de l'ekzist?  
Ĉu viaj vortoj prozaj aŭ versaj

Rememoratos de la gimnazist'?

Al kiu vi direktas metaforojn?  
Ĉu iam aperiĝos kunsentant'?  
De tutaj viaj lacaj pensfervoroj  
Ĉu etroveblas ie komprenant'?

Paperoj polvaj, tablo, ronĝkrajono -  
Restaĵo de pasinta vivotemp'.  
Sed iam vi estadis ĉampiono  
Priskribis la belecon de printemp'.

Sinjoro, lasu, lasu tiun adon  
Reiĝu simpla homo de la urb'  
Ekĝuu ordinaran maskaradon,  
Ne emu al enuo kaj perturb'.

15.01.10

## Forkuras la somer'

(Kanzon-traduko)

Kiam vi eldiris la finon  
Tiam ja ŝajnis al mi blag'  
Ni kune pelis papilion,  
Por ni pasis tiu tag'.

Kiam ho paliĝis la sento,  
Eĉ tiam esperis la kor',  
Sed skuas jam la vitron vento,  
fenestre malhelas la for'.

De ni jam fuĝas la somer",  
Jen la frond' flaveta nur',  
De ni forkuras la somer',  
polva vent' laŭ ĝia spur',

Septembro venis jam al nia voj',  
ploras jam nuda kampo',  
Tien kuradas eĉ nun la amor',  
perdita de l' amanto.



Nur en mi flamas la memor',  
Memoro pri l' somera sento,  
Larmigas min la akra vento,  
Atakas tempest' en la for'.

De ni forkuras la somer",  
Jen la frond' flaveta jam',  
Demande vekas min la ver',  
Kion plu? Kia am'?



Tradukis **VIZI László** (Hungario)

*Oni povas aŭskulti al la kanzono kantata de la tradukanto ĉe:*

<http://www.ipernity.com/blog/61797/226049>

## Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)



## Knabineto kun alumetoj

—laŭ ĉinesko Zhuzhici (Bambuoj)\*

lastvespere de l' jaro  
mallum' kaj frostbarbaro  
atakis knabinon kun  
alumetoj en staro

ŝi malriĉa maldika  
kun korpo malfortika  
laŭstrate piednuda  
vagis en vento pika

alumetojn ŝi vendis  
sed tuttage etendis  
neniu helpan manon  
al ŝi, kiu atendis.

ŝi de frid' kaj malsato  
suferis kiel kato  
senhejma erarvagis  
jen de strato al strato

tiam etoso festa  
 etos' en domo nesta  
 bonodor' de frandaĵoj  
 ŝvebis kun log' aresta

en ĉiuj domoj brilo  
 kandela en trankvilo  
 gloris pompe spicite  
 per varmega babilo

dume ŝi en obskuro  
 tremis sub frost-torturo  
 eltenis l' atakon de  
 malriĉ-sorta teruro

hejmen ŝi ne kuraĝus  
 iri ĉar paĉj' damaĝus  
 ŝin per batoj tiel ke  
 ŝi en sanglarmoj naĝus

ĉar monon ŝi ne povos  
 porti, vere sin trovos  
 la famili' en fasto  
 neni' en ĝi renovos

inter panik' kaj timo  
 ŝrumpis ŝia animo  
 ŝi kaŭriĝis ĉe l' angul'  
 dronante en deprimio

kiel ŝi ĉe ĉi moment'  
 deziris kun tikla sent'  
 eĉ varmeton portempe  
 je sia kurta kontent'

jen ŝi elprenis brave  
 alumeton enrave  
 el skatolet' kaj frotis  
 kontraŭ muro mankave

riŝ! ekflagris fajrero  
 ŝi tuj sentis en vero  
 varmeton ĉe la fingroj  
 brule dum efemero

ŝi ŝajne eksidis jam  
 ĉe forno kun arda flam'  
 lign-pecoj brulis lumis  
 kvazaŭe al si balzam'

riŝ! alia alumet'  
 brulis kun fajra impet'  
 ŝi avide varmiĝi  
 volis per mana almet'

tiam ŝajne tramure  
 ŝi jam vidis plezure  
 riĉan tablon kristnaskan  
 kaj meleagron sure

ŝi ekfrotis la trian  
 kaj trovis lumradian  
 magazenon en imag'  
 per lampoj variian

ekbruligis novan ŝi  
 vole ke daŭru l' magi'  
 por ŝin regali bone  
 per bel' en frida medi'

jen ŝia anj' alvenis  
 kiu ŝin ĉirkaŭprenis  
 per siaj varmaj brakoj  
 kaj firme ŝin altenis



milde kriis la knabin'  
 “anjoo,” en la halucin'  
 “kunportu min al loko  
 kie varmo flegos min.”

ŝi sentis svenon fine  
 kaj ankoraŭ obstine

finfrotis alumetojn  
 ŝi falis korpokline

ŝin sieĝis l' obskuro  
 regis tomba teruro  
 ŝia animo soris  
 kun anjo en veturo

oni en matena hor'  
 vidis scenon kun horor'  
 ŝia kadavr' rigide  
 kuŝis sur planka marmor'

ŝi ankoraŭ kun ridet'  
 dormis dolĉe en kviet'  
 restis ŝia pozo por  
 varmiĝi per alumet'

tamen oni ne vere  
 sciis, kiel fiere  
 ŝi vivis en lum-mondo  
 plezure kaj libere



*Zhuzhici (Bambuoj): ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

## Serio da Tiaoxiaoling

### Cezar (Germanujo)



### Hurlado patria

(2010-02-23)

Fia, fia  
 hurlado patria!

kriad' el Sodomo  
 pro stulto laŭ Romo.  
 "Moro, moro",  
 krias greg' dum horo!

### Vejdo (Ĉinio)

### Milda edzino

edzin', edzin'  
 al mi kun korinklin'  
 hejmsidas ĉiame  
 prizorgas min ame  
 ema, ema  
 al kisado ĝema  
 Lily (Ĉinio)  
 Soifa je amoro  
 imag', imag'  
 turmentas min sen ag'  
 mi volus per bora  
 stang' por ĝuo vora  
 ravo, ravo  
 en vagina kavo

### Cezar (Germanujo)

### Plagata edzo

(2010-02-23)

Sekstag', sekstag'!!  
 Tia in' estas plag'.  
 Kaptante laŭ bubo  
 ŝi falas ĉe rubo:  
 "Boru, boru,  
 ni tuj ekamoru!"

### Eto (Ĉinio)

### Sopire

kore, kore  
 tiras sent' dolore  
 rememoron veku  
 imagadon eku  
 kune, kune  
 kun fraŭlino nune

## Cindy Mckee (Usono)



### La foko en bestĝardeno ŝatas trinki...

Naĝo, naĝo  
 apud arta plaĝo.  
 Spektanto surdoka.  
 Al soifo foka,  
 kafo, kafo  
 en granda karafo

## Vejdo (Ĉinio)

### Songe

svage, svage  
 penso iras vage  
 bonŝanca loteri'  
 pagas min per premi'  
 mire, mire  
 mi ĝojas delire

## Lily (Ĉinio)

### Amludo

pene, pene  
 iras kac' senĝene  
 en piĉon pilgrime  
 ja ambaŭ intime  
 meti, meti  
 por boron ripeti

lude, lude  
 petolu senprude  
 la afer' prefera  
 la kontakto vera  
 rave, rave  
 do orgiu brave

krie, krie  
 li boras pasie  
 ŝi ĝemetas kun ĝu'

ravas plezure du  
 dure, dure  
 piŝtas kac' susure

## Cindy Mckee (Usono)

### Unua provludo

Konu, konu!  
 Koncerton ni donu  
 laŭ stilo baroka  
 Ludu je la sepa!  
 Pase, pase  
 ekis mi frakase

surde, surde,  
 ja, vere absurde  
 ŝrikis per trombono  
 en terura tono  
 noto, noto  
 groteska el gloto

## Viktoro (Ĉinio)

### Tigro

tigro, tigro  
 kun strioj de nigro  
 reĝo ĉiopova  
 laŭ volo bontrova  
 vora, vora  
 kun sono horora

### Feroĉa tigro

tigro, tigro  
 manĝanto en migro  
 kun kapric' barbara  
 en mondo arbara  
 raba, raba  
 per ungego klaba



## Cezar (Germanujo)

### Tigro, tigro!

Tigro, tigro  
 kun flav' kaj stri-nigro  
 al la hom' senpova.  
 Do ne plu bontrova.  
 Varo varo  
 sur felobazaro.

### Tango

Tango,  
 tango,  
 ambaŭ vang' al vango  
 ŝvelas sang' ĝiskreve.  
 Ambaŭ paŝas reve.  
 Vere,  
 vere,  
 logas takt' konkere..



\*Tiaoxioling (Flirta Kanto): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

&&            &&            &&            &&

## Alphonse Allais (1854-1905)



### Senpripensaĵo

. Mi konis ŝin en restoracio.

Jam de kelka tempo, ŝi regule venis tien vespere je la sesa. Mia despero estas, ke ŝi ne direktis sian atenton al mi.

Mi vane sidiĝis ĉe la najbara tablo, donis al ŝi afablajn mienoj, faris malgrandajn servojn al ŝi, kiel oni faras inter klientoj; nenio okazis.

Tamen iun tagon, kiam ŝi frapante sur la tablon malpacienciĝis, pro tio ke la kelnero ne alvenis, mi per mia voĉo la plej indigna kriegis :

– Kelnero, ĉu vi do estas surda ? Jen jam dum du horoj la sinjorino alvokas vin !

Ŝi turnis sin al mi, kaj per rideto dankis min.

Tiam, mi tuj amis ŝin.

Kaj ŝiaflanke, la ĝeno de la unua kontakto estis malapeinta.

Ekde tiu momento, ĉiutage vespere ŝi ne ĉesis saluti min per beleta "bonan vesperon", tiel gracia kaj pimpa kiel ŝi.

Kaj poste ni fariĝis bonaj kamaradoj.

Ŝi nomiĝis Luciana.

Ne estante **honesta virino**, ŝi estis ankaŭ ne publikulino. Ŝi apartenis al tiu kategorio de virinoj, kiujn la burĝoj malestime nomas **subtenadajn virinojn**.

Ŝia **sinjoro**, dika viro de grandega digneco, nur malofte venis ĉe ŝi. Inspektisto de Asekura Kompanio specialigita en la venenaj fungoj, li ofte vojaĝis eksterprovinco, kaj lasis al Luciana oftajn libertempojn.

La nura maloportunaĵo de tiu amrilato estas ke la dignega sinjoro estis terure ĵaluza, kaj li ĉiam neatendite alvenis en la hejmon de sia sinjorino, ĝuste kiam ŝi malplej atendis lin.

Sen sentigi al mi frakasan pasion, Luciana bone amis min.

En tiu epoko, mi estis ankoraŭ juna, kaj havis gajan humoron, kiun la turmentoj de la vivo forbalais kiel pajleron.

Luciana estis ankaŭ tre gaja.

Mi fariĝis freneze amema de ŝi, kaj de antaŭ kelkaj tagoj mi ne kaŝis al ŝi mian amflamon. .

